

Pierre Bovet

Claude Gacond, 122-a radioprelego, 1966.02.02 & 1966.02.05

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas Svisa Kurtonda Radiostacio. Prelegas Claude Gacond pri la granda svisa humanisto Pierre Bovet.

La 2-an de decembro 1965 mortis en sia 87-a jaro Pierre Bovet, svisa edukisto mondkonata. Por ni, esperantistoj, Pierre Bovet estas la granda advokato por la instruado de esperanto « *en la lernejoj de la tuta terglobo* ».

Por la pedagogoj Pierre Bovet estas la aŭtoro de hodiaŭ klasikaj verkoj pri la infana psikologio. Ni citu du titolojn : *Le sentiment religieux chez l'Enfant* [La religia sento ĉe la Infano] kaj *L'Instinct combatif* [La batal-instinkto].

Por la eduk-reformemuloj Pierre Bovet estis kun Edouard Claparède la stariganto de la Instituto Jean-Jacques Rousseau aŭ Universitata Instituto por Eduk-sciencoj, tio en Ĝenevo.

La filozofiaj verkoj de Pierre Bovet pritraktis temojn, kiuj estas karaj al la romandaj humanistoj : La homo, la vero, la respekto al la vivo, la konkretigo de la propra etiko per agoj en la socia vivo. Kiel titoloj de tiuj verkoj ni menciuj *Lettres de Jeunesse*, *Lettres de Grandchamp*, *Pensées*, *Lettres d'Alexandre Vinet*, *Jean-Amios Comenius* [Junaĝaj leteroj, Korespondado el Grandchamp (nomo de la domaro, kie vivas la familio Bovet jam ekde pluraj generacioj)], *Pensoj*, *Korespondado de Alexandre Vinet* (romanda pensulo, kiu dediĉis sian vivon al la defendo de la pens-libereco), *Jan-Amios Komenius aŭ Komensky* (tiu fama ĉeĥa humanisto, pioniro de la pedagogio konsiderata kiel scienco). Kiel vi divenas per la nura aŭdo de tiuj titoloj, Pierre Bovet sin ofte esprimis per la buŝo de siaj pens-amikoj.

Pri la socia agado de Pierre Bovet mi mencias lian redaktan kunlaboron al la gazeto *L'Essor*, organo sendependa de la ekleziaj medioj kaj politikaj partioj, sed kiu tamen ludas gravan rolon en la religia kaj politika vivo en Romandio. Dum pluraj jaroj Pierre Bovet organizis la porstudentajn prelegojn de Sainte-Croix (horloĝindustria centro en la Ĵurasa Montaro), manifestacion, kiu spirite influis tutan generacion da protestantaj intelektuloj en la direkton de toleremo kaj traduko en konkretajn agojn de sia etiko.

Sed vin ĉefe interesas la laboro de la samideano. En la historio de nia movado Pierre Bovet estas la prezidanto de la du unuaj pedagogiaj kongresoj okazintaj en 1922 en Ĝenevo kaj en 1927 en Prago. Esperanto estis la sola traduk-lingvo de tiuj kongresoj, kies raportoj ankoraŭ nun estas studataj de la pedagogoj, kiuj interesiĝas al la influo pri la esperanto-instruado en la lernejoj kaj pri la influo de la lernejoj rilate la pacon kaj la militon.

En la dua kongreso oni ekzemple komparis lernolibrojn pri nacia historio kaj reliefigis ilian neobjektivecon kaj danĝeran influon porŝovinisman.

Bedaŭrinde post 40 jaroj ne okazis multaj ŝanĝiĝoj tiurilate. Mensogoj ĉiam plenigas tiujn librojn, kiuj instruas la glorigon de la patria heroaro kaj la suspektemon al la najbaraj landoj. La lernejoj, anstataŭ fariĝi edukejo al tuthomeco, restis edukejo al limigita patriotismo.

En 1948 Pierre Bovet publikigis la raporton *Enketo pri Internacia Helplingvo*. Temas pri fundamenta verko, kiu raportas pri enketo entreprenita de la Instituto por Eduksciencaj pri la rezultoj de la instruado de la help-lingvoj. Sinjorino Henriette Ith dum multaj jaroj plenumis la sekretarian laboron por tiu enketo. Ŝi estas hodiaŭ la lasta vivanta atestanto pri tiu pionira kaj giganta laboro, kiu neniam estis refarita. Parto de la dokumentoj pri tiu enketo troviĝas nun en la Centro Edmond Privat de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds.

Konklude al tiu enketo Pierre Bovet montris, ke ne nur gravas la lingvo, sed ankaŭ ĝia spirita atmosfero. Mi citas lin :

« Internacia lingvo devas [...] ne nur kontentigi scienculojn kaj lingvistojn, sed ankaŭ gvidantojn de pensado kaj agado. Ĝi devas helpi al forigo de mallarĝa naciisma egoismo, kiu nun ree minacas la tutan homaron per ankoraŭ pli granda katastrofo ol la ĝisnunaj. [...] »

« La infanoj devas trovi spiritan nutraĵon en la lingvo mem, en la vivo de ĝia kreinto, en la literaturo ekzistanta, precipe en la literaturo de la unuaj tempoj de la ekzisto de la helplingvo, kiu vive respegulas la celon, la kuraĝon, la daŭremon, eĉ obstinecon de la tiamaj pioniroj, kiuj devis suferi por sia idealo.

Tiaj ekzemploj estas necesaj por infanoj, por igi ilin elkore deziri iĝi mem valoraj membroj de la homa komunumo.

*Ni ofte vidis, kiel infanoj entuziasmiĝis por fama militisto, prezentita al ili kiel heroo, aŭ, kun pli da praveco, por esploranto, aŭ aviadisto. Se ni volas elvoki la nun tiom necesan **homaranan** komprenon, ni ne povas havi pli taŭgan ilon, ol tutmondan helplingvon. [...]*

*La fakto, ke la faŝistaj registaroj malpermesis ne nur la uzadon de Esperanto por korespondado kun eksterlando, sed eĉ ĝian lernadon kaj instruadon, pravas, ke ili atribuis al Esperanto kapablon influi la spiriton de iliaj regatoj kaj helpi al ĝia liberiĝo. **Neniu alia lingvo** – eĉ ne la angla, kiu tamen estis la lingvo de iliaj plej gravaj kaj multaj malamikoj – estis submetita al simila kontraŭeco. La libroj skribitaj en Esperanto estis konsiderataj kiel **malutilaj** al la faŝistaj reĝimoj kaj estis kiel eble plej multe detruataj. Por liberemaj homoj, tiuj faktoj povas nur substreki la valoron de Esperanto. »*

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-